

Theodor Fontane,

## Tagmezo

*tradukita de Manfredo Ratislavo*

La pinoj sonĝas, kaj tiriĝas  
nubetoj ĉe l' ĉielo nur;  
kvietas tiom, ke aŭdiĝas  
la trankvilego de l' natur'.

En suna bril' herbej' malbruas,  
kaj mutas arba foliar';  
sed sonas, kvazaŭ pluvo fluas  
sur la foliojn de l' arbar'.

*Traduko de la Germana poemo "Mittag" de THEODOR FONTANE (Teodoro Fontano, \*1819-12-30 – †1898-09-20) en Esperanton de MANFREDO RATISLAVO (Manfred Retzlaff, Stettiner Str. 16, D-59302 Oelde, Germanio, \*1938-11-04) en 1984-03-31.*

*MR-086-1 / Arg-290-588 (2012-10-06 16:47:15)*

*Pri la poeto vidu la retejon [http://eo.wikipedia.org/wiki/Theodor\\_Fontane](http://eo.wikipedia.org/wiki/Theodor_Fontane).*